

KONTAKTO



Tendaro
por ŝtelistoj

Malnovtestamenta
sekreto de la Adama ripo

Magia akvo

numero 234 (2009:6)
ISSN 0023-3692

fotita de Kristle Fleming, permesilo CC-BY-NC

Malnovtestamenta sekreto de la Adama ripo

(Konstantin Efetov, Ukrainio) 3

Tendaro por ŝtelistoj

(Julian Modest, Bulgario) 7

La ĉina lingvo por nederlandlingvanoj

(Berthold van Maris, Nederlando) 10

Profesoro – popola idolo

(Alice Liu, Ĉinio) 12

“Tia estas Brazilo!” aŭ galerio de la brazilaj superstiĉoj

(Alexandre Serafim, Brazilo) 13

Magia akvo

(Rusa popola fabelo) 14

Historia aktoraro

(Gary Miller, Usono) 16

Kiel sendi kontribuojn al Kontakto?

- ✓ Sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan.
- ✓ Se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Kontakto ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!
- ✓ Indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ Rete bonvolu sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ Ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj!

Saluton, karaj legantoj de Kontakto!



Jen la lasta numero de la jaro 2009. Ĝi rezultis sufiĉe divers-tema, do mi esperas, ke vi legos ĝin kun intereso. Aparte atentu la artikolon pri la malnovtestamenta sekreto de la ripo de Adamo – ĝi prezentas sufiĉe interesan opinion pri la biblia historio kaj samtempe rakontas pri kelkaj interesaj bioĥemiaj aferoj.

Mi sincere gratulas ĉiujn (ankaŭ tiujn, kiujn la papera versio de la revuo atingos kun ioma prokrasto) okaze de la novjaraj festoj kaj esperas, ke ankaŭ sekvajare vi restos kun *Kontakto*! Bonvolu ne forgesi, ke nia revuo bezonas viajn kontribuojn ĉiujare – do ne hezitu verki, proponi, demandi kaj kritiki. Viaj opinioj kaj kontribuoj vere gravas kaj bezonatas!

Sukcesojn al vi en la nova jaro deziras

Paŭlo,
la redaktoro

Temoj de la venontaj numeroj de Kontakto

Numero 235 (2010:1). “Moderna arto”. Rapidu pri la kontribuo.


Numero 236 (2010:2). La ĉef-temo: “Medicino – tradicia kaj scienca”. Medicina estas tio, kio koncernas ĉiujn homojn. Do ne estas mirinde, ke ekzistaj miloj da diversaj metodoj en medicino, foje eĉ kontraŭdiraj. Ĉu vi kredas homeopation? Ĉu akupunkturo helpas? Ĉu vi konas iun ekzotan kurac-metodon, pri kiu oni nepre devas rakonti sur la paĝoj de Kontakto? Rakontu kaj diskutu!
Limdato: la 1-a de marto!

Kiel ĉiam, ajnatemaj kontribuoj estas bonvenaj kaj ege bezonataj!

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). Fondita en 1963. **N-ro 234** (2009:6), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/node/7>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ☒ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44; fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** Kontakto, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jalto, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro:** Paŭlo Moĵajev (Ukrainio) **Tipografisto:** Lucas Vignoli Reis (kun helpo de skipo de Preface Design, <<http://www.preface.com.br>>). **Korektisto:** Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). **Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facilgvaj Artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila kaj facila*, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. **Anonctarifo:** tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas double. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncetoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn kontraŭ dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifo:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Salahutuplein 40, NL-5262 ZN Vught, Nederlando. **Kontakto en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): Radio Havano (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15-a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Malnovtestamenta sekreto de la Adama ripo

Konstantin Efetov, Ukrainio



“La kreo de Eva” (fresko de Mikelaĝelo sur la plafono de la Siksta kapelo)

Kiom da ripoj havas la viro?

Unu el la Patroj de la Eklezio, Sankta Aŭgusteno (354–430) diris: “Se Dio estus destininta por la virino esti mastrino super la viro, Li kreus ŝin el kapo, se esti sklavo – Li kreus ŝin el piedo; sed pro tio, ke Li destinis por ŝi esti amikino, egala al la viro, Li kreis ŝin el ripo.”

En la Malnova Testamento, en la dua ĉapitro de Genezo estas skribita la jeno: “Kaj Dio la Eternulo faligis profundan dormon sur la homon, kaj ĉi tiu endormiĝis; kaj Li prenis unu el liaj ripoj kaj fermis la lokon per karno”. Tial dum longa tempo oni opiniis, ke la viro devas havi unu ripon malpli, ol la virino.

Nur en la 16-a jarcento tiun opinion refutis la fondinto de scienca anatomio Andreo Vezalio (latine – *Andreas Vesalius*, 1514–1564). Sed kun kiaj malfaciloj li faris tiun malkovron! La nekropsiojn en la tempo de Vezalio oni rigardis kiel grandan pekon. La sciencisto nokte surgrimpis sur pendumilojn, riskante la vivon, demetis la kadavrojn de la pendumitoj, dismembrigis ilin kaj kaŝis

la korpo-fragmentojn en la apud-vojaj arbustoj; poste li po-parte portis la restaĵojn hejmen por anatomiaj studoj. Li subaĉetis la tombej-gardistojn por ke tiuj permesu al li elterigi la mortintojn, kaj se mono mankis, li malfermis la tombojn kaŝe, pro kio la gardistoj multfoje batis lin. Pri-studinte multe da kadavroj, Vezalio trovis, ke kaj la viro, kaj la virino havas la saman kvanton de ripoj – 12 ĉe ĉiu flanko. Tiu revolucia konkludo sonis kiel blasfemo. En sia verko “Pri la strukturo de la homa korpo” la granda anatomo skribis: “La opinio, ke la viroj ĉe unu flanko estas senigitaj je iu el la ripoj kaj ke la virino superas la viron pri la rip-kvanto estas tute ridinda, kvankam Moseo konservis la rakonton, ke Eva estas kreita de Dio el la Adama ripo.”

La opinioj de Vezalio tiel klare ruinigis la instruojn de ĉiuj antaŭaj aŭtoritatuloj, ke de li distanciĝis eĉ lia instruisto, *Jacobus Sylvius* (nacilingve konata kiel *Jacques Dubois*). Sylvius faris denuncon al la imperiestro, petante puni Vezalion: “Mi petegas vian imperiestran moŝton puni



Andreo Vezalio (dumviva portreto fare de Stephan van Calcar)

kaj bridi tiun monstron de malklereco, sendankemo kaj arogo, tiun plej pereigan ekzemplon de malpieco, por ke tiu monstro ne venenu Eŭropon per sia pesta spiro...” Finfine la hispana inkvizicio akuzis Vezalion pri tio, ke li onidire tranĉmortigis vivan homon, kaj kondamnis lin al mort-puno. Tamen, la ekzekuto estis anstataŭigita per la ordono viziti la sanktajn lokojn en Palestino por satisfakcio. Dum tiu vojaĝo Vezalio mortis ĉe ne tre klaraj cirkonstancoj. Tiel la granda sciencisto per sia vivo pripagis la sciencan veron, kiun li eltrovis por la nedankema homaro.

Evidentas do, ke ne eblas trakti la vortojn el la Malnova Testamento rektasence. Tamen, ĉu eble ni povas trovi iun alegorian mesaĝon en tiu fragmento? Ni rememoru, per kio la virino diferencas disde la viro, tamen, ni parolu ne pri morfologio, sed pri la seksaj hormonoj.

Du paradoksoj de la seksaj hormonoj


Seksaj hormonoj estas substancoj de steroida strukturo, derivitaj el ciklopentanoperhidrofenantreno. Por eviti konfuzon, la sciencistoj interkonsentis pri numerado de la karbon-atomoj en tiuj substancoj (la skemo estas prezentita sur la bildo). Ni atentu tiun sistemon, ĉar ni ankoraŭ bezonas ĝin.

La sintezado de la seksaj hormonoj havas du specifajojn, kiuj unuavide ŝajnas esti paradoksaj. La unua paradokso konsistas el la fakto, ke kaj viroj, kaj virinoj sintezas kaj la virajn, kaj la virinajn seksajn hormonojn. Do la dominantaj sekundaraj seksaj karakteroj dependas nur de la fragila proporcio inter tiuj substancoj. La seksaj hormonoj estas

sintezataj ne nur en la seksaj glandoj (testikoj kaj ovarioj), sed ankaŭ en la kortiko de la surrenaj glandoj. Interalie, en ĉiuj menciitaj glandoj estas sintezataj kaj la viraj, kaj la virinaj seksaj hormonoj sendepende de la sekso. Simple ĉe la viroj testikoj produktas pli da viraj hormonoj, dum la virinaj ovarioj – pli da virinaj hormonoj.

La viraj seksaj hormonoj ricevis la nomon *androgenoj* (de la greka vorto “άνδρoς”, kiu signifas “viro”). La virinaj seksaj hormonoj nomiĝas *oestrogenoj* (de la vorto “οἰστρος”, kiu signifas “forta deziro”). La virinoj ofte plendas, ke la viroj “seks-molestas” ilin. Sed en la vero la seksuma impulso ĉe la virinoj estas neniel malpli granda – kaj tion respegulas ankaŭ la nomo de la virinaj seksaj hormonoj. Estas konata la jena historia anedokto: post la Oktobra revolucio en Rusio (en la jaro 1917) bolŝevikoj trovis, ke sub du najbaraj monaĥejoj (la vira kaj ina) oni estis fosantaj la subteran galerion. De la vira monaĥejo la galerio estis direktita al la ina monaĥejo, kaj de la ina – al la vira monaĥejo. La revolucio haltigis tiujn laborojn, kaj la du partoj de la tunelo ne estis interkonektitaj. Sed jen interesa afero: la longo de la tunelo, farita de la monaĥinoj, evidentiĝis duoble pli longa, ol tiu farita de la monaĥoj. Certe, tio povas atesti pri pli granda laboremo de la virinoj, sed oni ne forgesu ankaŭ pri la “forta deziro”.

Koncerne la seksajn hormonojn nia vivo estas kvazaŭ futbala ludo. Komence unu teamo venkas, sed kiam oni pun-forigas kelkajn ludantojn de la forta teamo la supereco transiras al la alia teamo. Iom post iom la funkciado de la seksaj glandoj malaktiviĝas kaj ili produktas ĉiam malpli da hormonoj, karakterizaj por la koncerna sekso (tio similas al la forigo de ludantoj de la ludejo), tamen la kortiko de la surrenaj glandoj daŭre produktas kaj androgenojn, kaj oestrogenojn. Pro tio la relativa kvanto de la aliseksaj hormonoj pligrandiĝas. Ĝuste tial al viroj en granda aĝo povas aperi virinaj sekundaraj seksaj karakteroj (ekzemple, pligrandiĝo de mamoj), kaj al virinoj – la viraj (ekzemple,



La numerado de karbon-atomoj en steroidaj kombinaĵoj

ekkresko de barbo kaj lipharoj). Lige al tio eblas rememori unu anekdoton:

Unu homo renkontas sian amikon kaj diras al li, montrante iun viron en homamaso: “Rigardu tiun ulon. Se ne estus lipharoj, li estus kopio de mia bopatrino”. La amiko miras: “Sed li ne havas lipharojn!” – “Jes, sed mia bopatrino ja havas!” Aŭdinte tiun anekdoton bioĥemiisto tuj diros: “Bopatrino estas grandaĝa virino. Pro la kresko de relativa kvanto de la viraj seks-hormonoj al ŝi ekkreskis haroj laŭ la vira tipo. Science tio nomiĝas *hirtismo*”.


La dua paradokso de la seksaj hormonoj kuŝas en la vojo de ilia metabolo. Ni sintezas la seksajn hormonojn el kolesterolo. Jes, ĝuste el tiu kolesterolo, kiun oni tiel timas, akuzante ĝin pri tio, ke ĝi provokas aterosklerozon. Certe, aterosklerozo ne estas bona afero, tamen, sen kolesterolo neniu homo realiĝos kiel viro nek kiel virino. Do, el kolesterolo estas produktata la universala antaŭulo de ĉiuj steroidaj hormonoj – pregnenolono. Ĉi tie troviĝas bioĥemia disvojiĝo. El pregnenolono povas formiĝi aŭ la hormonoj de la surren-glanda kortiko (glukokortikoidoj kaj mineralokortikoidoj), aŭ la seksaj hormonoj. Tamen estas interese, ke kaj la viroj, kaj la virinoj komence sintezas la virajn seks-hormonojn kun la kvanto de la karbonaj atomoj egala al 19; poste per forŝiro de la metila grupo en la deka pozicio androgenoj estas transformataj en virinajn seks-hormonojn, kiuj havas nur 18 atomojn de karbono. Do, ĉiu virino kreas sian virinan esencon el la vira, forŝirante la metilajn grupojn de la androgenaj molekuloj.

Ĉu viro aŭ virino?


La sekso de la homo estas determinita de la kromosomaro. Ĉiuj sanaj homoj havas en ĉiu somata (neseksa) ĉelo 46 kromosomojn, du el ili nomiĝas “seksaj”. La viro diferencas de la virino nur per unu seksa kromosomo. Se oni havas du X-kromosomojn (XX) – oni estas virino; se oni havas unu X- kaj unu Y-kromosomojn, oni estas viro. Interalie, ne por ĉiuj biologiaj specioj validas la samo. Ekzemple, ĉe kokoj ĉio estas inversa.

Por ke la karakteroj, respondaj al la biologia sekso, povu aperi, ne sufiĉas nur havi la necesan kromosomaron. Bezonatas, ke la gena programo estu bone realigita. Ĝuste por tio ekzistas la substancoj, kiuj reguligas la biosintezon de proteinoj – ili estas la seksaj hormonoj. Kio okazos, se ili ne povos plenumi sian funkcion? Oni povas ricevi klaran respondon al tiu demando, pritraktinte unu tre interesan malsanon. Ĝi nomiĝas “testika feminiĝo” aŭ “sindromo de Morris”. Tiu patologio estis unuafoje priskribita en 1817, sed la termino “testika feminiĝo” estis enkondukita nur en 1953 fare de J. C. Morris.



Tiu hereda malsano estas kaŭzata de la difekta recesiva geno AR (de la angla “*androgen receptor*” – androgena



Skemo de la molekulo de kolesterolo (hidrogenaj atomoj ne estas montritaj)



La vojoj de biosintezo de la steroidaj hormonoj (parenteze estas menciita la kvanto de karbonaj atomoj)



Transformiĝo de androgeno en oestrogenon

ricevanto), kiu situas en la X-kromosomo. Tial la malsano estas seks-ligita kaj estas transdonata same kiel hemofilio – de la patrino al la filo. La kaŭzo de ĉiuj simptomoj estas manko de molekuloj-ricevantoj, kiuj “rekonas” la virajn seksajn hormonojn. Tio kondukas al nesentiveco de la periferiaj histoj al la efikoj de androgenoj. Rezulte la homo kun viraj seksaj glandoj (testikoj) aspektas kiel virino. Pro tio, ke en la ĉeloj la kromosomaro estas vira, oni povas karakterizi Morris-sindromon kiel heredan varianton de vira pseŭdohermafroditeco. Kaj nun ni parolu pli detale pri la simptomoj de tiu stato.

La homoj kun Morris-sindromo estas altaj, belstaturaj, fortaj, tre belaj virinoj kun forta volo kaj alta intelekto. Eblas diri, ke ili estas supervirinoj. Ili tamen ne havas uteron, sed ja havas mallongan kaj blinde finiĝantan vaginon. En iuj okazoj la eksteraj seks-organoj povas aspekti kiel tipe virinaj. Tial post la naskiĝo oni opinias la infanon knabino kaj, kompreneble, edukas lin kiel knabinon. La testikoj povas troviĝi ene de la abdomena kavo, tial foje tute ne eblas trovi ilin. En iuj okazoj ili povas troviĝi en grandaj pudendaj labioj aŭ esti palpeblaj kiel negrandaj ingvenaj “hernioj”. Dum la seks-maturiĝo al tiaj homoj aperas bone formitaj mamoj.

Tia knabino kreskas kaj bone sukcesas pri lernado. Maturiĝinte, ŝi sentas normalan por virinoj sekslogon al viroj; pro la fakto, ke la seks-organoj estas virinaj, ŝi eĉ kapablas al normala seksumado. Iom suspektinda estas nur la manko de menstruoj. La junulino povas eĉ edziniĝi, sed gravediĝi ŝi neniel povas (ĉar utero mankas), kaj la geedza paro finfine venas al la kuracisto-genetikisto. Post la priesploroj tiu povas diri persone al la edzo: “Pardonu, sed vi ne povos havi infanojn, ĉar via edzino estas... viro!”. Kaj sekvas muta sceno.

Kaj nun ni parolu pri alia afero. Kial la malsanuloj je Morris-sindromo havas altan intelekton kaj fortan volon? Al tiu demando respondis elstara sovetia genetikisto Vladimir Efroimson. Li pruvis, ke la viraj seksaj hormonoj havas stimulan efikon al la nerva sistemo. Estis pruvite ankaŭ, ke la malsanuloj je Morris-sindromo havas pli altan nivelon de androgenoj, ol normalaj viroj, ĉar ĉe la normalaj viroj androgenoj estas utiligataj en la periferiaj histoj kaj krome estas malŝparataj dum sperm-elĵetoj. Sed la malsanuloj je testika feminiĝo ne povas tion fari pro la apartaĵoj de sia anatomia strukturo – rezulte la intelekto ĉe ili estas pli alta, ol ĉe la averaĝa viro.

La ofteco de Morris-sindromo estas relative alta: 1 okazo por 65 mil virinoj (ja oni devas serĉi tiujn virojn ĝuste inter virinoj!). Antaŭ kelkaj jardekoj, kiam en grandaj sportaj konkuroj oni ne kutimis fari medicinajn testojn pri la sekso, la kvanto de la viroj kun tiu malsano atingis 1 elcenton (do, ĝi estis 650-foje pli ofta, ol averaĝe en la homa populacio).



Viro kun Morris-sindromo

Kaj tio estas klara – ja por viroj estas pli facile superi la virinajn rekordojn. Estas interese, ke V. Efroimson faris diagnozon “sindromo de Morris” ankaŭ al la granda saventino de Francio – Jeanne d’Arc.

Nun, kiam ni scias, kiajn seriozajn postsekvojn povas havi la misa funkciado de la seksaj hormonoj, ni traktu la metilan grupon (kiu malsamigas la viron kaj la virinon) kun pli da estimo.

La ripo de Adamo

Sed ni revenu al la ripo de Adamo. La Mosea Pentateŭko (parto de la Malnova Testamento, kiu enhavas ankaŭ Genezon) estas kolekto de historiaj, leĝodonaĵoj kaj mitologiaj tekstoj, kiu laŭ la sciencistoj estis kompilita en sia praa formo en la 12-10a jarcentoj a.K. Tamen la priskribitaj historiaj okazaĵoj okazis multe pli frue – en la 17-13a jarcentoj a.K., kiam la popoloj, menciitaj en la Biblio, ankoraŭ ne havis skribsistemon. Tial la pastroj kaj skribistoj, fiksante la tekstojn, povis bazi sin nur sur la folklora buŝa tradicio.

Kaj nun ni provu imagi la situacion, ke posedanto de plej alta intelekto aŭ sendito de progresinta civilizo (ni ne parolu pri ĝia deveno – ĉu aliplaneda aŭ dia) decidis transdoni parton de siaj scioj al la loĝantoj de la Tero, kiuj estis tiam tre malmulte evoluintaj. La interparolo en tiu okazo similus al la interparolo de profesoro kun malgrandaj lerneĵanoj. Dezirante transdoni al la infanoj siajn sciojn pri metabolo de seksaj hormonoj, la profesoro diras

la jenan frazon: “La virinaj seksaj hormonoj estas formataj el la viraj per forŝiro de metila grupo en la deka pozicio”. La lernejoj, certe, komprenos nenion. Ni imagu, ke la saman frazon diris al prahomo iu alt-intelekta estaĵo aŭ reprezentanto de aliplaneda civilizo, kiu vizitis la Teron por nelonga tempo. Kion komprenos la homo? En la plej bona okazo li komprenos nur la tri vortojn: “viro”, “virino”, “forŝiri”. Poste la homo enpensiĝos: “Kion eblas forŝiri de la viro, por ke li daŭre restu viro kaj ke lia aspekto ne ŝanĝiĝu?” Primitivaj anatomiaj scioj de la prahomoj ebligis pensi pri unu el la ripoj. Ĉu eblas pensi, ke ĝuste tiel aperis la mito pri la ripo de Adamo? Kaj la rakonto pri tio, transdonata buŝe dum multaj jarcentoj, finfine estis fiksita en la skribaj fontoj.

La leganto eble kontraŭdiros, ke la alt-intelekta estaĵo ne parolos pri la seksaj hormonoj kun prahomo. Eble. Sed eble jes – kaj transdoni tiajn sciojn eblis nur en tia simpligita formo. Lige al tio mi rakontu unu parabolon:

“Al unu tre saĝa patro, doktoro de fizik-matematikaj sciencoj foje venis la kvar-jara filo kaj demandis, de kie aperis la steloj. La patro ekĝojis, ke lia fileto estas tiel saĝa, kaj komencis rakonti al li la bazojn de kvantuma mekaniko. Kompreneble, la infano ekploris kaj forkuris al la avino, kiu simple rakontis al li fabelon, ke la steloj aperis el gemoj, kiujn faligis bela princino – kaj la knabo tuj trankviliĝis. Kiu do agis pli saĝe – ĉu la patro aŭ la avino?”

Kompreneble, ĉiu konsentos, ke la avino agis pli saĝe, malgraŭ tio, ke la patro ja rakontis la veron. Tamen, por kompreni la kvantuman mekanikon la filo devas iom kreski, dum en la infaneco necesas aŭskulti fabelojn kaj kredi ilin.

Kaj nun ni revenu al la transformiĝoj de la seksaj hormonoj. La tutan miton pri la kreo de Eva kaj Adamo

eblas interpreti kiel klonadon kun modifo de la klono. Oni prenis de Adamo nur unu ĉelon (ne tutan organon), modifis ĝian DNA-n por ebligi sintezadon de kromaj fermentoj, kiuj reguligas la respektivajn bioĥemiajn procesojn (ankaŭ la forŝiron de la metila grupo en androgenoj). Kiam la ĝusta reakci-kaskado estas lanĉita, tiu ĉelo estis uzita por formi la virinan organismon. Ĝuste tial la kvanto de la ripoj estas la sama – 12 paroj: ĉar neniu ripo estis fakte forigita.

Do, la eventuala interpreto de la malnova mito estas la jena: la virino estis kreita el la viro ne per forŝiro de la ripo, sed per forŝiro de la metila grupo en la deka pozicio! Nu, almenaŭ ĝuste tiel okazas en ĉiu virina organismo.

El la rusa tradukis P. Moĵajev

PRI LA AŬTORO

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas biologo, biokemiisto kaj kuracisto, loĝanta en Krimeo, Ukrainio. Li estas profesoro de la Krimea ŝtata medicina universitato, kie li estras la departamenton de biologia kemio kaj laboratorion de bioteknologio. Vi povas legi pri li en la Esperanta vikipedio: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Konstantin_Efetov>. La aŭtoro ĝojos ekscii vian opinion pri la artikolo kaj la prezentitaj ideoj. Viajn reĥojn en la rusa aŭ angla lingvo bonvolu sendi al la adreso <konst@efetov.crimea.ua>. Viajn leterojn en Esperanto bonvolu sendi al nia redakcia adreso <kontakto@tejo.org>, ni nepre transdonos la leterojn al la aŭtoro.

RAKONTO

Tendaro por ŝtelistoj

Julian Modest, Bulgario

En la tendaro por ŝtelistoj mi ne estis hazarde. Delonge oni konis min. Mi ŝtelis de infanaĝo. Jam en la elementa lernejo, tiu ĉi mia pasio ekbrulis kiel fajro, kaj mia lerneja teko ĉiam estis plena je alies skribiloj, kraĵoj, skatoloj... Miaj gepatroj, honestaj homoj, ne sciis kion fari. Hejmen senĉese venis avoj kaj avinoj de miaj samklasanoj por plendi, ke multekostaj skribiloj kaj kajeroj de iliaj nepoj malaperis. Okazis tiel, ke ĉion, kio malaperis, oni serĉis ĉe

mi kaj jam neniu eĉ supozis, ke iu aĵo povus simple perdiĝi. Mia kompatinda patrino malsaniĝis pro turmento kaj ĝeno. Ŝi velkis kaj eksimilis al arbo, trafita de fulmo, dum iam ŝi estis bela kaj alloga. Kiam mi frekventis la unuan klason, mi tre fieris pri mia bela panjo. Mia patro provis min edif-puni tiel kiel li sciis. Li batis min kiel tamburon kelkfoje tage, sed rezulto ne estis. Mi daŭre ŝtelis kaj nenio povis deflankigi min de la vojo, laŭ kiu mi iris.

— Kion mi faru? – ĝemis la paĉjo. – Ĉu mi tranĉu liajn manojn kaj li iĝu invalido por la tuta vivo, aŭ mi mortigu lin?

La panjo konstante kondukis min al kuracistoj kaj psikoterapeŭtoj, sed vane. Mi aspektis kvieta, eta knabo simila al poŝhorloĝo, kaj kiam la kuracistoj kaj pedagogoj, ĉefe junaj, simpatiaj virinoj, vidis min, ili miris kaj ne povis kredi, ke tiu ĉi ĉarma, bone vestita bubo ŝtelas kiel sperta ŝtelisto. Ili faris ĉion eblan por helpi min. Dum horoj ili konversaciis kun mi, demandis, kiu mi estas, kion mi ŝatas, ili elpensis diversajn stultaĵojn, sed mi rigardis ilin kviete kiel ŝafido, kiu eĉ malbonan vorton ne povas diri, tiom pli ŝteli ion.

Dum la seancoj mi tre enuis. Mi sidis kvazaŭ en flava dezerto, super kiu la suno pendas kiel grandega oranĝo kaj por iom distri min, mi ŝtelis aŭ monujon aŭ ion alian de la kuracistinoj aŭ pedagoginoj. Ili eĉ ne povis eksenti la momenton, kiam iliaj aĵoj malaperis. Dum sekundoj mi povis ŝteli ĉion, kion mi deziras. Mi estis ege fiera, ĉar mi konstatis, ke tagon post tago mi iĝis pli kaj pli perfekta. Nur la panjon mi ne povis dormigi. Kiam ni estis kune, ŝi staris streĉita kiel soldato sur posteno ĉe raketodromo kaj ŝiaj okuloj eĉ por sekundo ne moviĝis. Pro tiu ĉi konstanta atento ŝia rigardo iĝis akra kiel bajoneto kaj la muskoloj de ŝia vizaĝo estis kvazaŭ streĉita indiana pafarko. Ŝi tiel premis lipojn, ke en ties anguloj formiĝis du severaj kri-signoj. Konstante ŝi spionis min, sed malgraŭ ŝia agla rigardo, ŝi ne povis vidi kiam malaperis la monujo de la kuracistino kaj kiam ĝi transiris de ties poŝo al la mia. Tio estis arto, kiun eble tre malmultaj homoj regis, kaj mi estis unu el ili. Tamen mia patrino havis sian provitan kaj seneraran metodon senvualigi min. Kiam finiĝis la seanco, ŝi tre afable petis min ekstari, levi la brakojn kaj antaŭ la okuloj de la kuracistino aŭ pedagogino ŝi komencis traserĉi min de la ŝuoj ĝis la kapo kiel sperta policisto. Post sekundoj ŝi elprenis el mia maniko aŭ pantalonrando la monujon de la kuracistino. La panjo alrigardis min venke kiel soldato, kiu portas standardon. La povra kuracistino mirkriis kaj tuj stuporiĝis. Ŝi ne povis kredi, ke ŝia monujo estas en la mano de la panjo. La kuracistino komencis febre kontroli siajn poŝojn, fosserĉis, ŝvitis maltrankvila kaj finfine konvinkiĝis, ke la panjo tenas ĝuste ŝian monujon, kiun antaŭnelonge ŝi elprenis el mia pantalonrando.

Estis kuracistinoj, kiuj rigardis tion kiel senpagan spektaklon. Ili ridis, miris, admiris min, karesis mian kapon kaj verŝajne ili forgesis, ke mi estas ĉe ili por resaniĝi de mia terura pasio ŝteli. Foje tamen la panjo serioze suferis. Ni estis ĉe fama profesoro, simpatia, kvieta oldulo kun blankaj kiel glacio haroj kaj okuloj kun koloro de malnova oro. Li tre longe pridemandis min, parolis al mi, konsilis min ĝis kiam li sukcesis preskaŭ dormigi min. Mi jam tiel enuis,

ke mi ne sciis kien rigardi kaj pri kio mediti. Mi ne eltenis, miaj fingroj jukis, kvazaŭ mi trempis ilin en vinagron.

Antaŭ la eniro en la ĉambron de la profesoro, la panjo tre severe avertis min, ke mi eĉ ne pensu ŝteli ion. Mi promesis, ke nenion mi ŝtelos de la bona profesoro, sed post duonhora lekcio mi ne eltenis kaj ne plenumis la promeson. La granda monujo de la profesoro tre lante kaj elegante transiris de lia jakpoŝo sub mian puloveron kaj eĉ iom pufiĝis ĝin, ĉar la monujo estis sufiĉe dika kaj peza. Eble la profesoro ĵus ricevis sian profesoran salajron.

Kiam la seanco finiĝis, la profesoro, tre kontenta, premis mian manon kiel al aĝa viro kaj certigis la panjon, ke mi neniam plu ŝtelos. Li aldonis, ke li havas grandajn sukcesojn en tiu ĉi kuracado kaj ofte oni invitas lin eksterlanden por helpi siajn eksterlandajn gekolegojn. La panjo dankis lin kun skeptika rideto, pro kiu ŝiaj lipoj deformiĝis kiel demandsignoj, sed ŝi decidis antaŭ nia foriro atente kaj detale traserĉi min. Certe ŝi ne kredis al la profesoraj kapabloj. La profesoro staris antaŭ ni ridanta kare kaj indulgeme. La panjo rapide trovis sub mia pulovero la dikan profesoran monujon, elprenis ĝin kaj la profesoro ŝtoniĝis. Lia ĉarma rideto forflugis kiel timigita strigo kaj liaj okuloj ekbrilis kiel kugloj. Kelkajn sekundojn li strabis sian monujon en la mano de la panjo, poste li kaptis ĝin kiel akcipitro kaj komencis krii. Li eĉ ne kriis, sed kriegis per akrasona voĉo kvazaŭ iu false fajfis. Anhele spiranta, li ripetadis, ke la panjo kaj mi estas krimuloj, kiuj venis al li ne por helpo, sed prirabi lin. Li minacis tuj voki policon, ĉar oni devas ne kuraci krimulojn, sed sendi ilin en malliberejon. La profesoro kriegis ĉiam pli kaj pli forte. Li jam estis ruĝa kiel brulanta forno kaj ĉiumomente povis fali surteren kiel forhakita arbo. De la ĉarma, kvieta oldulo restis nenio. Nun antaŭ ni staris furiozanta virkapro, kiu tuj kruele pikos nin per siaj akraj kornoj. Mia povra panjo jam povis nek paroli, nek moviĝi, ŝi rigardis lin tiel timigita, ke mi kompatis ŝin. Nenion ŝi kapablis klarigi, la profesoro kriis kaj ne lasis ŝin malfermi la buŝon. Mi ne komprenis kiel ni eliris el la ĉambro de la kolerigita profesoro, sed post tiu ĉi tago, la panjo ĉesis konduki min al la seancoj kaj lasis min fari, kion mi deziras. Kompreneble, mi daŭrigis la ŝteladon. Oni vokis min en policejojn, sed mi ankoraŭ ne estis plenaĝa kaj oni ne povis kondamni min. La policanoj nur minacis, ke post kelkaj jaroj oni kondamnos kaj malliberigos min.

Kaj tute neatendite mi trafis la tendaron por ŝtelistoj en la vilaĝo Derven. Estis sekreta tendaro, okazinta en forlasita montodomo, en kiu oni kolektis grupon de neplenaĝaj ŝtelistoj, knaboj kaj knabinoj. Mi ne sciis, kiu kolektis nin, kiu estis tiel bone informita pri niaj neordinaraj kapabloj. Mi mensogis al miaj gepatroj, ke mi iras al lerneja tendaro kaj ili tuj konsentis. Eble ili opiniis, ke dum mia foresto ili

iom ripozos de miaj malagrablaj surprizoj. La paĉjo donis al mi monon kaj severe avertis min, ke en la tendaro mi ne ŝtelu. Li, kompatinda, eĉ ne supozis, ke mi iras ĝuste por perfektigi miajn ŝtelistajn konojn.

Nin instruis du tre spertaj ŝtelistoj. Mi devas konfesi, ke ili sciis tre multajn sekretojn, sed ŝajnis al mi, ke mi estis pli bona ol ili. En tiu ĉi tendaro mi komprenis, ke ĉiun metion oni devas lerni longe kaj pacience. Sendepende de tio, kiom talenta vi estas kaj kiom dotis vin la naturo, vi bezonas perfektigi viajn spertojn kaj kapablojn.

La du aĝaj ŝtelistoj deziris perfektigi nin kaj eble poste ni devis labori por ili aŭ por ia sekreta ŝtelista organizo. Kiel en ĉiu tendaro, ankaŭ ĉi tie regis severa ordo kaj disciplino. Antaŭtagmeze estis lekcioj kaj ekzercoj kiel nomis ilin iu el la lektoroj. Posttagmeze ni ekskursis, futbalmatĉis kaj vespere amuziĝis en la dancejo. Dum la ekzercoj mi estis la plej bona kaj la instruisto, ĉirkaŭ tridekjara viro, kiu pli similis al aktoro ol al ŝtelisto, estis tre kontenta pri mi kaj konstante montris min kiel ekzemplon de lerta ŝtelisto.

Tamen en la tendaro mi konatiĝis kun Gema, knabino pli juna ol mi. Mi ne sukcesis kompreni kiomjara ŝi estis, ĉar Gema ne vizitis lernejon kaj ŝi ne sciis precize kiam ŝi naskiĝis. Foje ŝi diris, ke estas dekkvar-jara kaj foje, ke estas dekkvin-jara. Ĝis tiam mi ne songis tiel belan knabinon. Gema havis vizaĝon kaŝtankoloran kaj molan kvazaŭ silka tuko kaj migdalajn okulojn, kiuj ĉiam mokridetis. Ŝiaj brakoj, maldikaj kaj malpezaj, similis al blankaj mevaj flugiloj kaj ŝia korpo estis elasta kiel truto.

Mi ne scias kiel Gema amikiĝis kun mi. Mi estis kiel ĉiuj aliaj buboj, sed Gema ĉiam staris ĉe mi de mateno ĝis vespero. Mi devas konfesi, ke ŝi estis ege talenta ŝtelistino, eĉ ŝajne pli talenta ol mi. Ofte, kiam ni estis kune, Gema

tute senkulpe demandis min, kioma estas horo, kaj tiam mi komprenis, ke mia horloĝo jam delonge estas ĉe ŝi. Gema komencis ridi, ŝiaj blankaj dentoj brilis kiel rizo kaj ŝia rido elverŝiĝis kiel akvofalo. Fiere Gema redonis al mi la horloĝon. Estis ankaŭ momentoj, kiam mi eksentis, ke ŝi ŝtelas ion de mi, sed mi ŝajnigis, ke nenion mi komprenis, por plezurigi ŝin.

Mi ekamis Geman kaj mi trafis alian mondon, pri kies ekzisto mi antaŭe eĉ ne konjektis. Ŝiaj kisoj narkotis min kiel centjara vino kaj ŝiaj varmaj manplatoj degeligis min. Mi jam certis, ke sen ŝi mi povas nek spiri, nek vidi, nek aŭdi, sed io stranga komencis okazi al mi. Nesentebles mia talento kaj pasio ŝteli malaperis. La instruisto, kiu similis al aktoro, komencis koleri kontraŭ mi kaj anstataŭ laŭdi min kiel en la komenco li pli kaj pli ofte skoldis min. Mi penis, ŝvitis, sed vane. Tute malaperis la facileco kaj inspiro, per kiuj la diversaj aĵoj transiris de la fremdaj poŝoj en la mian. Mi ne sciis, kio okazis al mi. Anstataŭ perfektigi, mi pli kaj pli rigidiĝis. Mi komencis koleri kontraŭ mi mem. Ĉu mi estas la plej malkapabla? Nur Gema komprenis min kaj trankviligis min per kisoj, maturaj kaj dolĉaj kiel arbaraj fragoj.

Mi freneziĝis pro amo kaj nenio alia interesis min plu. Ofte vespere ni ambaŭ kuŝis ĉe iu arbusto, rigardantaj la profundan ĉielon kun la sennombraj pulsantaj steloj. Ŝajnis al mi, ke Gema sorĉis min kaj mirakle ŝi malŝlosis en mi alian grandan talenton – ami. Mia kapablo ŝteli malaperis por ĉiam. Unu pasio anstataŭis la alian. Kaj nun, post tiom da jaroj, mi daŭre songas Geman.

Mi ne ŝtelas. Ŝtelado jam ne kaŭzas tian plezuron al mi kiel iam, kiam ies monujo nesentebles eniris mian poŝon.



Fotita de Uncle Brad, permesilo CC-BY-NC-ND

La ĉina lingvo por nederlandlingvanoj

Pro tio, ke 875 milionoj da homoj parolas la mandarenan lingvon kiel gepatran lingvon, ĝi certe estas la plej granda lingvo de la mondo. La nederlanda ĉinologo Jeroen Wiedenhof verkis grandan kaj facile alireblan gramatikon, kiu baziĝas sur la parolata lingvo.

Berthold van Maris, Nederlando

La ĉina kiel unueca lingvo, fakte, ne ekzistas. Tio, kion oni nomas la ĉina, estas fakte aro de sep lingvoj, el kiuj la mandarena estas la plej granda lingvo, oficiala en Ĉinio, Tajvano kaj Singapuro. Ankaŭ mondscale ĝi estas la plej parolata gepatra lingvo, estante pli-malpli duoble pli granda ol la angla, la hispana aŭ la hinda.

Laborante en la universitata Ĉinologia Instituto de la urbo Lejdeno, Wiedenhof publikigis grandan gramatikon de la mandarena lingvo, kiu celas ne nur nederlandanojn, kiuj klopodas ellerni la lingvon (kaj komencantojn kaj progresantojn), sed ankaŭ tiujn, kiuj interesiĝas pri lingvoj ĝenerale. Ankaŭ por tiuj nederlandanoj, kiuj ne scias eĉ unu vorton en la ĉina, la libro legeblas tre facile kaj klarigas multon pri la strukturo de la mandarena.

Lia deirpunkto estis priskribi la mandarenan tiel, kiel ĝi efektive estas parolata. Tio ŝajnas logika, sed gramatik-libroj ĝenerale emas malfrui kompare al la aktuala lingva evoluo – kaj certe, se paroli pri la mandarena. Wiedenhof diras: “En la ĉina oni skribas jam dum miloj da jaroj, kaj postrestis multe da malnova literaturo. Sekvo de tio estas, ke ĉiam gravas nur la skribo, kiu estas ne iu ajn skribo, sed la ĉina, kiu ne estas rekta reprodukto de la sono.”

La lingvoj skriba kaj parola

La skriba kaj la parola lingvoj tre malsamas. Tion rimarkis Wiedenhof mem, kiam li vizitis Pekinon post tri jaroj da studado. Evidentiĝis, ke li kelkfoje ne komprenis la plej kutimajn frazojn, kiel “He, kion vi faras?” En la universitato li lernis: “Ni zuo sheme?” (“Vi fari kion?”). Sed en Pekino oni plej ofte diras: “Gan ma, ni?” (“Fari kion, vi?”) – kio estas alia verbo, alia vorto anstataŭ “kion” kaj ankaŭ alia vortordo. “Estas strange, ke kvankam la frazo estas tre simpla kaj ĉiutaga, eĉ post tri jaroj da studado mi ne komprenis ĝin”, li diris.

Li tamen metis tiun frazon en sian libron. “La loko de la vorto vi en la fino estas ĉarma. Tio okazas ankaŭ en la nederlanda lingvo. “Leuke jongen, die Kees” (“Ĉarma knabo, tiu Kornelio”); “Ik heb hem niet gezien, je fiets”

(“Mi ne vidis ĝin, vian biciklon”). Oni aldonas ion poste kiel pliklarigon. Tio okazas ankaŭ en la mandarena, kaj mi havas la impreson, ke estas kutime tiel paroli. Kelnero en iu restoracio diras ekzemple, kiam la gastoj estas forirontaj: “Foriru malrapide, vi”. Li volas diri: “ne hastu, ne rapidu, ĝis revido”. Tio iĝis respektoformo, almenaŭ en Pekino.

Alia ekzemplo. Same kiel en multaj lingvoj, en la mandarena oni ne diras: “li estas sportisto” – sed sufiĉas diri: “li sportisto” (*ta yundongyuan*). Tamen, ĉino tute ne povas imagi, ke oni skribas tion tiamaniere, sen la karaktero, kiu signifas “estas” (*shi*). “Tion oni renkontas nur en eksperimenta poezio aŭ hipermodernaj reklamoj”, diras Wiedenhof, “sed ne en gramatiklibroj, ĉar oni tiel ne skribas. Lingvaj reguloj estas striktaj, kaj la ĉina instruado estas tre preskriba. Tio, kion diras la instruisto, estas vera. Kaj tio, kio estas en la libroj – eĉ pli. Kompreneble, ankaŭ en la nederlanda lingvo la skriba kaj parola lingvaĵoj malsamas. Sed kiam oni legas la Ĝeneralan Nederlandan Gramatikon tie eblas trovi sufiĉe da parolaj elementoj.”

Estante en Pekino, Wiedenhof ĉiam kunportas not-kajeron. Aŭdinte ion novan aŭ rimarkindan, li tuj notas tion en ĝin. “Tio estas bona metodo registri vortojn kaj esprimojn”, li opinias. “Sed tia notkajero ne sufiĉas por pristudi la frazkonstruon de la mandarena parolata. Tiukaze ĉiutagajn konversaciojn oni surbendigu.” Li faris ankaŭ tion. En la komenco de la naŭdekaj jaroj por sia doktoriĝo li surbendigis konversaciojn, de kiuj li poste precize transskribis 5 000 frazojn per la pinjino, kiu estas latin-baza skribsistemo por la transskribo de la ĉina lingvo. “Oni vidu ilin surpapere”, li diris. “Tiam frapos la okulojn multaj gramatikaĵoj troveblaj en neniuj vortaro aŭ gramatiko, kiel ekzemple la verbo signifanta neesti. Estis strange, ke neniuj tion kredis, kiam mi tion publikigis. Eĉ ne ekzistas speciala karaktero por tion skribi – mi mem devis elpensi iun karakteron”.

Tonlingvo

Nederlandanoj plej ofte opinias la ĉinan tre malfacile lern-

ebila. “La skribo estas granda obstaklo”, konfirmas Wiedenhof. “Kaj krome ekzistas la tonsistemo.” La mandarena estas tonlingvo: la silaboj estu elparolataj je difinitaj ton-alto kaj modulado. Depende de tiu tono la silabo *shu* povas signifi *libro*, *matura*, *nombri* aŭ *arbo*. Vorto, kiun oni ne elparolas ĝustatone, estas por ĉino nekomprenebla.

Ĉiujare Wiedenhof kutimigas novan grupon da studentoj al tiu tonsistemo. “Temas ne nur pri la tonalto, sed ankaŭ pri sonforto kaj rapido. Do pri alta/malalta, laŭta/mallaŭta, kaj rapida/malrapida. Se oni volas tion klarigi al nederlandanoj, ekzistas nur unu komparo: la intonacio de frazo, kiun ili uzas por esprimi, ekzemple, furiozon aŭ miron, sed ankaŭ por indiki, ke la frazo estas demando. “Kaas! “ (*fromaĝo!*) sonas alie ol “Kaas? “ (*Fromaĝo?*). Mi klopodas konsciigi miajn studentojn, kion ili faras en la nederlanda per intonacio: “Kaas?” – kio okazas en tiu frazeto? La tono altiĝas. Nu, tio estas pli-malpli la dua tono de la mandarena. Kaj “Bah!” en “Bah, wat vies! “ (*Ba! Kiel malpura!*) estas proksimume la kvara tono.”

Se temas pri tonoj, jam malgrandaj infanoj estas sufiĉe sentemaj. Antaŭ la unuaj vortoj ili jam sukcesas komuniki ion per intonacio. Spiregante altatone “h! h! h!” ili indikas, ke ili ion deziras, dum malalta, nekontenta “mmmmm!” signifas: “ne”. “Iuj studentoj esploras la lingvon analize”, diras Wiedenhof. “La aliaj – laŭ intuicio. Tiuj lernas plej rapide: ili ankoraŭ povas agi infane. Sed ili ne kapablas klarigi, kion ili faras.”

Deklinacioj

Kio pri la frazkonstruo? En la mandarena ne ekzistas konjugacioj aŭ deklinacioj. Oni dirus: tio estas facila, ĉar la vortojn *kuri*, *kuras*, *kuris*, *kuranta*, *kurinta* oni tradukas per nur unu vorto. Same pri *amiko*, *amikino*, *amikoj* kaj *amikinoj*. La mandarena plej ofte ne distingas inter pasinteco, nuno kaj estonteco, nek inter vira kaj ina seksoj, nek inter singularo kaj pluralo.

“La nederlanda forte diferencas de tio”, diras Wiedenhof. “Se oni intencas iun vesperon diboĉi, oni preskaŭ ne povas ne menci, ĉu oni faros tion kun amiko, kun amikino, kun grupo da amikoj aŭ kun grupo da amikinoj. La strukturo de la nederlanda lingvo devigas menci kaj klarigi tion. En la mandarena ĉiam eblas lasi tion nedecidita. Se necesas, eblas diri, ekzemple, “grupo da amikoj”, kio laŭvorte estas “grupo amiko”. La problemo por nederlandanoj estas, ke ili ofte parolas la ĉinan tro korekte, ĉiufoje dirante “amiko grupo”, se temas pri “amikoj”. Eĉ tiam, kiam tio ne gravas tiurilate. Tion oni dekutimigu al si.”

Nederlandanoj nur kun grandaj penoj liberigas sin de la verbotempoj. “Ili ĉiam volas esprimi, kie la ago situas en la tempo rilate al la nuno. Pri tio ili daŭre okupiĝas, kaj tion

oni ĉiam enplektas en la verbon. En la mandarena tio ofte ne bezonatas.” Aliflanke, en la mandarena oni ja esprimas aliajn verbajn aspektojn, nome – kiamaniere okazas la ago aŭ kie ĝi situas en la tempo (neligita al la nuno). Simplan frazon, kiel “La akvo bolas” oni povas diri dumanier, depende de tio, ĉu ĝi jam bolas dum iom da tempo aŭ ĵus ekbolis. Tiajn nuancojn oni esprimas per malgrandaj vorteroj, kompareblaj al la vortoj *jam*, *ankoraŭ* kaj *ĵus*. Estas malfacile ekmajstri tiujn nuancojn, kiuj svarmas en la mandarena.

Ekzistas plia diferenco. Nederlandanoj kutimas konstrui frazojn ĉirkaŭ subjekto kaj predikato, kies interrilato estas la fundamento de la frazo. En la mandarena temas pri alia centra rilato, nome – tiu inter “temo” kaj “komento”. Wiedenhof donas kiel ekzemplon la frazon “Nuli mai” (sklavo vendi). “Nederlandano facile interpretas tion kiel “la sklavo vendas ion”, sed tio ne nepras. Ĝi povas signifi ankaŭ “la sklavo estas vendita”. Tiu frazo signifas ne pli ol “temas pri iu sklavo kaj okazas vendado”. Ĝi povas esprimi multajn ideojn: “la sklavo ĝin vendas”, “la sklavojn ni vendas”, “al la sklavo ni ĝin vendas” ktp. La kunteksto plej ofte klarigas, pri kio temas. Se oni volas esprimi sin pli ĝuste, la mandarena abundas je ebloj. Sed se ne estas bezonate, oni ne pliĝustigas.” Ankaŭ tiurilate nederlandanoj emas fari frazojn tro multvortaj.

Inverse

Se la mandarena estas tiel malfacila por nederlandanoj, ĉu ankaŭ la nederlanda estas tia por ĉinoj? Wiedenhof ridas: “Jes, ĉar tiam temas pri la samaj aferoj, sed inverse. Singularo, pluralo. Ina, vira. La verbotempoj.” Ĉinoj opinias niajn grupigitajn konsonantojn malfacilaj, ekzemple “pr, str, kl”, krome, la nederlanda havas multajn vokalojn. Ĉinoj malfacile liberigas sin de la tonsistemo. Komencantoj lernas nederlandajn vortojn ĉiam je difinita tono. Do la vorto “boek” (libro) estas ĉiam elparolata je alta tono, kio sonas kiel stranga intonacio en la oreloj de nederlandlingvanoj.

Tradukis: Koos Scharroo (Nederlandano)

La artikolo estas publikigata dank’ al la afabla permeso de la aŭtoro.

REFERENCO

JEROEN WIEDENHOF. Gramatiko de la mandarena, Bulaaq, 410 p., ISBN 90-5460-094-2

Profesoro – popola idolo

Oktobre de la jaro 2006 mezaĝa virino, gracia kaj laŭmode vestita, aperis en Tribuno de Majstroj de la Ĉina Centra Televido. Ŝi lekciis pri la “Analektoj de Konfuceo” en la televida programo. La tuta kurso konsistis el sep partoj: la homaro kaj universo, spirito, konduto, nobleca maniero, amikeco kaj la homa vivo. Edifa prelego en kanta tono perceptigis al la televidantoj afablecon kaj prudenton de mor-rigida kaj rigora Konfuceo. Sep tagojn poste ŝi fariĝis brila stelo kaj popola idolo. Ŝia libro “Pri la analektoj de Konfuceo” ĝuas grandan vendosukceson – unu pekina librejo vendis 1400 ekzemplerojn dum unu tago.

Alice Liu, Ĉinio

Ŝi estas Yu Dan, profesoro de la Pekina Normala Universitato, kiu nun laboras kiel direktoro de la fakultato pri filmoj kaj televido. Jam en la jaro 1988 ŝi ekaktivis kiel verkisto de filmoj kaj televidaj dramoj, kaj kelkaj el ŝiaj verkoj estas premiitaj. En la lastaj jaroj ŝi estis invitita al Singapuro, Japanio, Malajzio, Francio kaj Brazilo por prelego pri la ĉina kulturo.

Kial ŝi plaĉas al tiel multaj ĉinoj? Antaŭ kelkaj jaroj en Ĉinio iuj elementaj kaj mezaj lernejoj komencis alproprigi tradicion kulturon al la lernantoj, kaj inter pekinaj studentoj ekfuroris vestoj en la antikva stilo. La tutmondiĝo akcentas la ideon de integreco kaj samtempe evidentigas la gravecon de kultura identigo. En la nuna mondo ĉiu nacio havas propran komunumon, kaj ĉiu, kiu volas sendependiĝi kaj sin evoluigi, devas ĉerpi kvintesencon el diversaj civilizacioj kaj ekspluati trezoron de la propra kulturo. Iu komentis en reta forumo, ke Yu Dan venigis konfuceanisman en la nunan vivon. Tio signifas, ke ŝi ĉerpis el la klasikaĵo elementojn utilajn al la nuna socio kaj donis al ili

novan eksplikon.

La entuziasmo kaj ŝato al Yu Dan reflektis mensan soifon de multaj ĉinoj. Post ekpraktiko de la politiko pri reformado kaj malfermo Ĉinio atingis grandan sukceson, kaj la kultura postulato de la popoloj altiĝis. Parto de ĉinoj riĉiĝis kaj ne plu estas maltrankvila pri la ĉiutaga vivo. Oni aĉetas aŭtojn kaj domojn kaj planas vojaĝojn. Tamen prospero de merkato kaj furoro de konsumismo ne povas komplete kontentigi la spiriton.

Sed iuj opinias, ke oni ne devas atribui la sukceson de la lekcio al la preleganto, ĉar la enhavo de la tradicia kulturo havas potencialan rolon por la nuna tempo. Historiistoj opinias, ke modernaj faktoroj de la Renesanco plejparte povas trovi la fonton en la meza antikveco. La prelego de Yu Dan, amuza kaj iom filistrea, estas proksima al la publiko. Antaŭe multaj majstroj lekciis pri konfuceanismo, tamen ili ne povis vekti tiel grandan interesigon. Iuj diris, ke Yu Dan sukcesis pro la aparta prelegmaniero. La kaŭzo kuŝas en tio, ke ŝi sekvis la leĝon de amaskomunikado kaj



uzis rimedojn, kiuj plaĉas al la publiko. Iuj opinias, ke ŝi staris sur la ŝultroj de giganto, la Ĉina Centra Televido, kiu havas monopolon super la ĉina televida komunikado: granda influ-povo de la televido sukcesigis ŝin.

Pri furoro de konfuceanismo Yu Dan komentis, ke ŝi estas iom maltrankvila pri la impulsigemo, bruado kaj necerteco de la furoro, ĉar subita varmiĝo kondukas

al rapida malvarmiĝo, kaj la socio jam ne povas toleri fanatikan predikon. Antaŭ du jaroj ŝi estis kandidatigita al elektado de plej belaj virinoj. Respondante la demandojn de raportistoj, ŝi foje diris, ke la beleco de 20-jara virino dankas al la naturdoto, sed tiu de pli aĝa virino dependas de la edukiteco.

ARTIKOLO

“Tia estas Brazilo!” aŭ galerio de la brazilaj superstiĉoj

Alexandre Serafim, Brazilo

Brazilo estas riĉa lando, se paroli pri la kulturo, ĉar diversaj popoloj venis vivi ĉi tien. Kiam Portugalio koloniis Brazilon, sur nia tero jam loĝis aro da diversaj triboj de indianoj, iuj pacaj, aliaj – hom-manĝantaj. Dum jardekoj okazis intermiksiĝoj inter afrikanoj, portugaloj kaj indianoj. Kiam dum regado de Portugalio indianoj kaj afrikanoj estis ankoraŭ sklavigitaj, aperis la popola kredo, ke manĝi bananon kaj trinki lakton estas malbone por la sano (ĉar estis malprofito al bien-posedantoj, se la sklavoj manĝis siajn varojn).

Nun Brazilo havas 170 milionojn da loĝantoj sur 8,5 milonoj da kvadrataj kilometroj, tial depende de la regiono la superstiĉoj, mitoj kaj popolaj kredoj tre diferencas. Tre interesa estas la indiana kredo en Amazonio pri la defendanto de la arbaro, nomata Curupira (legu *Kurupira*) – li estas indianido, ruĝ-haŭta kaj kun inversigitaj piedoj. Lia laboro estas protekti la vivulojn de la arbaro, kaj ĉia misaĵo, kiu okazas al la damaĝantoj de la naturo, estas la puno fare de Curupira.

Oni diras en Brazilo, ke kiam la kuirado estas pretervole misfaritaj kaj la bien-bestoj estas senkaŭze ekscititaj, tio estas la petoloj de kampara nigrulido; li estas unukrura, havas pipon kaj ruĝan magian ĉapeton, oni nomas lin Saci Pererê (legu *Saci Perere*). Ekde la jaro 2005 la 31-a de oktobro estas festata kiel la tago de Saci; la celo de tiu festo estas celebri la brazilan folkloron kaj malgrandigi la influon de *Halloween* en Brazilo.

Superstiĉoj pri malbono abundas en Brazilo. Ekzemple, oni diras, ke meti ŝuojn turninte la plandumojn supren estas malbona afero, kiu povas kaŭzi la morton de la patrino de la ŝuo-posedanto. En diversaj regionoj kiel antaŭsigno de morto povas esti opiniataj la jenaj situacioj: kiam la hundo



bojas dumnokte, kiam noktuo krias sur la tegmento de la domo, kiam nigra papilio enflugas la domon. Certe por malpermesi, ke la homoj dormu ĉe la tablo, aperis la kredo, ke ankaŭ dormado sur la tablo povas alvoki la morton.

Feliĉe, ekzistas ne nur malbonaj antaŭsignoj, sed ankaŭ la bonaj: manto kaj kokcinelo alportas bonan sorton al la domo, en kiu ili aperas; se en iu domo ekĉirpas grilo, do iu el la loĝantoj baldaŭ gajnos monon. Ankaŭ akcidente faligi

sukeron sur plankon estas bona antaŭsigno.

Multaj superstriĉoj estas ligitaj al kutimaj hejmaj aĵoj. Ekzemple, se venas en vian hejmon malagrabla gasto, necesas ĵeti iom da salo en la fornon aŭ meti balailon renversita malantaŭ la pordo – kaj la gasto baldaŭ foriros. Ne indas forbalai polvon al la strato, ĉar per tio oni povas forbalai ankaŭ la bonan sorton. Plie, ne indas forbalai la malpuraĵon de sur la piedoj de fraŭlino, alie ŝi neniam edziniĝos. Ankoraŭ unu superstiĉo, kiun mi bone memoras el mia infanaĝo: dum fulmotondro oni tuj kovris la spegulojn per ŝtofo, ĉar, laŭ la onidiroj, kiam oni rigardas sin en spegulo dum fulmotondro, tio povas altiri fulmon. Same la uzado de pluv-ombrelo en la hejmo povas kaŭzi pluvon aŭ eĉ morton.

Jen ankoraŭ kelkaj interesaj superstiĉoj. En Brazilo oni kredas, ke se graveda virino havas rondan ventron, ŝi naskos knabinon, kaj se la pintan – ŝi naskos knabon. Kiam doloras aŭ varmas la maldekstra orelo, tio signifas, ke iu malbon-parolas pri vi; por ke la misparolanto mordus sian langon, necesas dum la oreldoloro mordi sian ĉemiz-kolumon. Male, se varmas la dekstra orelo, tio signifas, ke iu bone parolas pri ni. Ekzistas ankaŭ la kredo, ke la infano, kiu ludas per fajro aŭ proksime al ĝi, pios dumdorme (tio estas ja tre “saĝa” superstiĉo, kiu helpas al la gepatroj sekurigi siajn geinfanojn).

Jen tia estas Brazilo – riĉa kulture, tradicie kaj ankaŭ superstiĉe!

FACILA FABELO

Magia akvo

Rusa popola fabelo



Iam vivis viro kaj virino. Kiam ili estis junaj, ili kun-vivis tute bone, pace kaj amike. Sed kiam ili mal-jun-iĝis, ili tre ofte mal-pac-iĝis. La maljunulo diros al la maljunulino unu vorton – ŝi respondos per kelkaj, li diros kelkajn – ŝi respondos per multaj. Kaj komenciĝas tre granda malpaciĝo.

Sed kiam ili volas kompreni, kiu estas kulpa pri la malpaciĝo – ili neniam sukcesis tion fari. La maljunulo demandas:

— Kio do okazis?

— Pri ĉio kulpas vi! – respondas la maljunulino.

— Ĉu mi? Ĉu eble vi estas kulpa pro via mult-parol-emo?

— Ne, estas vi!

— Ne, vi!

Kaj denove komenciĝas malpaciĝo.

Iam la maljunulino en-pens-iĝis – kion do fari? Kiel kunvivi kun la maljunulo? Ŝi iris al sia **najbarino** kaj rakontis pri sia malfeliĉo. La najbarino diris:

— Mi povas helpi al vi. Mi havas **magian** akvon. Kiam la maljunulo komencos kii, prenu iom da akvo en la buŝon, sed ne for-trinku ĝin; tenu la akvon en la buŝo ĝis la maljunulo trankviliĝos. Kaj ĉio estos bona.

Kaj la najbarino donis al la maljunulino iom da akvo en ujo. La maljunulino dankis ŝin kaj iris hejmen. Kiam ŝi

eniris la domon la maljunulo komencis kii:

— Kie vi estis? Kion vi faris? Mi volas manĝi kaj trinki teon, sed vi for-estas!

La maljunulino jam volis respondi al li, sed rememoris pri la konsilo kaj prenis en la buŝon iom da akvo el la ujo. La maljunulo ekvidis, ke la maljunulino ne respondas – kaj eksilentis mem. La maljunulino ekĝojis: “Ŝajne, la magia akvo vere helpas!”. Ŝi kaŝis la ujon kun la akvo kaj komencis kuiri la manĝaĵojn. Post iom da tempo la maljunulo denove ekkriis:

— Kial vi laboraĉas tiel longe? Ĉu vi ne sci-povas rapide kuiri?

La maljunulino volis tuj respondi al li, sed denove rememoris pri la konsilo de la najbarino kaj prenis iom da magia akvo en la buŝon. La maljunulo ekvidis, ke ŝi nenion respondas al li, ekmiris, kaj eksilentis mem.

Kaj de tiu tempo ili ĉesis malpaciĝi kaj ekvivis same, kiel en la junaj jaroj – nur dank’ al la magia akvo!

KLARIGOJ

najbaro – la homo, kiu loĝas tre proksime al vi

magia – havanta super-naturajn ecojn kaj fortojn

Subtenu la agadon de TEJO!

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi povas helpi ankaŭ al konkretaj agaderoj de TEJO.

Mondonacojn por ĝenerala agado de TEJO bv. Pagi al la UEA-konto “tejtej” (indiku la celon de la donaco, ekz: “donaco por KER” aŭ “donaco por landa agado”). Ankaŭ eblas fari donacon por specifaj celoj:

- Fonduso “Partoprenu IJKon” – per ĝi TEJO subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj en IJK;
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO.

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe <www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html> aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

JUNA AMIKO – Internacia E-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

Modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al Koresponda Servo Mondskala jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj.

Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, ne uzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B. P. 6, FR-55000, Longeville-en-Barrois, Francio**

KOTIZTABELO DE UEA POR 2010

MG Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T) Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago)

MA(-T) Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto

MA ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto

SA Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA

Kto Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO

SZ Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO-n (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	36	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Belgio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	8	20	50	32	19	100
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/krono	105	260	650	415	250	1300
Finnlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Francio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Germanio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Greklando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Hispanio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Islando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Japanio/eno	1300	3200	8000	4800	2900	16000
Kanado/dolaro	14	35	87	52	31	174
Latvio/lato	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Norvegio/krono	80	200	500	300	180	1000
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zloto	25	60	150	95	55	300
Portugalio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	95	240	600	380	230	1200
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	5	12	30	18	11	60

ALIAJ LANDOJ Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFO A Bahamoj, Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Historia aktorado

Gary Miller, Usono

Mia vera profesio estas denta teknikisto, tamen mi havas ankaŭ iom alian laboron (se vi volas, vi povas nomi tion hobia), pri kiu okupiĝas ankaŭ tuta mia familio: ĉiuj ni estas historiaj aktoroj. Mi aktoras kun mia edzino Barbara-Ĝo kaj du filinoj Johana (Hanjo, nun 18-jara) kaj Susana (Zanjo, nun 16-jara; jes ankaŭ miaj filinoj lernas Esperanton!).

Estas multaj historiistoj-aktoroj. Ni renkontris la homojn, kiuj prezentas famajn personojn, ekzemple,

la usonajn prezidentojn Abraham Lincoln aŭ Theodore Roosevelt, generalon George Custer kaj lian edzinon Elizabeth kaj tiel plu. Ni tamen prezentas simplan militistan familion, sed ni estas ankaŭ aparte kompetentaj pri la muziko de la jaroj 1861–1975. Mi mem ludas banĝon, mia edzino – apalaĉian dulcimeron (tradicia kord-instrumento), Hanjo – gitaron, Zanjo – akordionon, kaj ĉiuj ni kantas.



Hanjo kaj Zanjo

Dum niaj prezentadoj kaj prepariĝoj al ili ni zorgas ne nur pri datoj kaj famaj personoj. Ni atente studas ankaŭ malgrandajn aferojn – ekzemple, kuiradon, kudradon, loĝadon en tendoj (kaj tio foje ne estas facila – ekzistas ŝerco, ke kulo estas la oficiala ŝtata birdo de Norda Dakoto). Mi kaj miaj kunuloj-soldatoj foje devas marŝi kaj ekzerci kun armiloj kiel veraj soldatoj.

Ni ofte laboras kiel volontuloj, sed foje ni ankaŭ ricevas monon pro nia laboro, ekzemple, kiam tiaj aktoroj estas bezonataj por iu filmo. Tamen, la lernado de la

historio valoras multe pli, ol mono. Dank' al nia hobia ni ankaŭ trovas multajn bonajn amikojn, kiuj helpas unu la alian simile al la ĉe-landlimaj loĝantoj de antaŭaj jarcentoj. Krome, nia laboro allogas turistojn al nia ĉirkaŭaĵo. La laboro ankaŭ memorigas al la homoj pri la viroj kaj virinoj, indianoj kaj blankuloj, kiuj tiel malfacile laboris kaj batalis por siaj nacioj.

Mi kiel patro ĝojas, ke tuta mia familio kundividas mian pasion pri tiu interesa kaj amuza hobia.



Nia familio koncertas pri Abraham Lincoln